Bijlage bij
Aldono al ESPERANTO - JAN. 1981

# ESPERANTO EN BELGIO

Verantwoordelijke
Respondecas Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

## SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

La je 15 11 1980 de B.E.F.-sekretario dissendita cirkulero havis nur "magran" rezulton. Respondis nur Bruselo, Karloreĝo kaj Loveno (ESPERANTO 2000).

Krome konstatiĝas, ke niaj amikoj el Bruselo kaj Karloreĝo ŝajne ne sufiĉe atentis pri la proponitaj datoj, tiel, ke la organizaĵoj okazos super du semajnoj.

Jen la ricevitaj programoj :

-------

Mardon 17 02 1981

Esperantista Brusela Grupo invitas la respondeculojn de fremdlandaj rondoj al prezentado de la Esperanto-movado kaj al komuna vizito al tipe Brusela bierejo.

Ĵaŭdon 19 02 1981

Karloreĝa Esperanto-grupo invitas al informa kunveno pri la Semajno de Internacia Amikeco kaj al prezentado de filmoj kaj diapozitivoj pri Ruando en la salono de la Karloreĝa Urbodomo.

Sabaton 21 02 1981

Lovena ESPERANTO 2000 invitas en Kulturcentro Leuven, Brusselsestraat 63, al :

- 14.00 h. : oficiala malfermo de ekspozicio "ESPERANTO KAJ INTERNACIA AMIKECO"
- 16.00 h. : prelego pri tiu temo
- 20.00 h. : filmoj pri Loveno
- ĝis 22.00 h. : ekspozicio

La programo estas dediĉita al ne-esperantistoj.

Dimanĉon 22 02 1981

Lovena ESPERANTO 2000 daŭrigas sian programon por ne-esperantistoj:

- 10.00 ĝis 22.00 h. : ekspozicio
- 15.00 h. : prelegoj de kelkaj ne-esperantaj organizoj pri siaj celoj (temas pri organizoj, kiuj rilatas al internacia amikeco, ekz. Ruĝa Kruco, V.V.V. (Vereniging voor Vreemdelingen Verkeer) k.s.)

Kvankam la programo estos en la Nederlanda, ĉiu esperantisto estas ege bonvena !

Dum ambaŭ tagoj : konkurso kaj tombolo.

Informoj : Marc VANDENBEMPT, Duisburgstraat 12, 3030 LEUVEN/HEVERLEE



Dimanĉon 22 02 1981

Bruĝa PACO KAJ JUSTECO invitas, en la gotika salonego de la urbodomo, al solena malfermo de la Semajno de Internacia Amikeco.

- 10.30 h. : akademia kunsido, dum kiu parolados :
  - Rektoro H. BRUGMANS
  - la Urbestro de Bruĝo
  - S-ro F. ROOSE

  La kunsido estos sekvata de

  - honorvino oferita de la urbestraro.

13.00 h. : komuna tagmanĝo, sekvota de promenado aŭ kunsido, laŭ la vetero.

Personoj, kiuj intencas partopreni la komunan tagmanĝon, bonvole pagu antaŭ 10 02 1981 BF 450 en unu el la sekvantaj kontoj :

000 - 0428551 - 05

aŭ

470 - 0107631 - 82

de

Fernand ROOSE, St. Klaradreef 59, 8000 BRUGGE

menciante : tagmanĝo 22 02 1981

Antaŭan dankon.

Vendredon 27 02 1981

ESPERANTO MORTSEL intencis organizi BALON DE INTERNACIA AMIKECO sed, pro la fakto ke la salonego ne estos libera kaj okazos je tiu sama dato alia internacia junulara renkontiĝo en Anglio, ĉi tiu balo ne povos okazi.

<u>Sabaton 21 02 1981</u>

<u>LA [illegible] KALMTHOUT</u> invitas al la festado de la fermo-tago de la Semajno de Internacia Amikeco.

- 09.30 - 11.00 h. : en salono TREFPUNT :
  elekto de la Beneluks-Geambasadoroj de Internacia Amikeco.

  partopren-kondiĉoj :

  - aĝo inter 18 kaj 40 jaroj
  - loĝi en Belgio, Nederlando aŭ Luksemburgo
  - flua kono de la Nederlanda kaj/aŭ Franca. Kono de la Germana kaj/aŭ Esperanto estos aprezata.
  - ĝenerala kono de aktualaj okazaĵoj en la mondo rilate al la politika, soci-ekonomia kaj kultura vivo en la mondo, samkiel la lingvoproblemoj, speciale en la Benelukslandoj.

  La organiz-antoj substrekas, ke tute ne temas pri ia-speca universitata ekzameno, sed pri simpla esplor-demandado. La respondoj estu simplaj, klaraj kaj spontanaj.

  Kandidatoj sin anoncu al S-ro Jos ORBAN (vidu sube)

- 11.15 h. : proklamado de la elektorezulto
- 11.30 h. : akcepto en la urbodomo, dum kiu la Geambasadoroj estos instalitaj de la Urbestro.
- 12.00 h. : tagmanĝo en TREFPUNT
- 14.00 h. translima promenado
- 18.00 h. Di-servo en la preĝejo St. Jozef.
- 19.00 h. vespermanĝo en TREFPUNT
- 20.00 h. distra vespero.

| | | | |
|---|---|---|---|
| Vagonaroj : | - matene : | Antwerpen - Heide | 09.31 , 09.56 |
| | | Essen - Heide | 09.30 , 09.41 |
| | - vespere : | Heide - Antwerpen | 21.59 , 23.01 |
| | | Heide - Essen | 21.53 , 22.56 |

Pliaj informoj ĉe : Jos ORBAN
Statielei 17 A
2180 HEIDE-KALMHTOU

-----------------------

Bijlage bij
Aldono al
E S P E R A N T O - FEB 1981

# ESPERANTO EN BELGIO

Verantwoordelijke
Respondecas
Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

Ni multe bedaŭras, ke niaj komunikoj, en certaj kazoj, atingas vin tro malfrue. Ni pensas inter alie pri la anonco rilate al la Semajno de Internacia Amikeco kaj precipe pri la aranĝo en Bruĝo. Ni tamen ne povis antaŭvidi ke ESPERANTO, per kiu ni dissendas nian novaĵ-bultenon, aperis kun tiom granda malfruiĝo.

Kvankam ni sentas nin senkulpaj pri la malfruiĝo, ni tamen petas pardonon al niaj Bruĝaj amikoj, pro la fakto, ke ili verŝajne havis pli malgrandan partoprenantaron ol la deziratan.

Ni esperas, ke la aferoj baldaŭ normaliĝos pri ESPERANTO, tiel ke niaj komunikoj atingu vin en konvena tempo.

ANTVERPENO

Je vendredo 23-a de januaro, okazis en la kutima kunvenejo de LA VERDA STELO, komuna ĝenerala kunsido de la Esperanto-grupoj el la Antverpena aglomeracio. Ĉeestis kelkaj ĵurnalistoj, kiuj raportis pri la evento en diversaj gazetoj.
Kio okazis ?
Raportis pri sia agado reprezentantoj de la diversaj grupoj : Antverpeno, Deurne, Edegem, Mortsel kaj Wilrijk.
Plie estis honorigataj jenaj personoj :

| | | |
|---|---|---|
| - por 55 jaroj da membreco | : | S-ino Bl. VERMUYTEN kaj S-ro A. FAES |
| - " 35 " " " | : | F-ino B. GEERS kaj S-ro K. AALBERS |
| - " 30 " " " | : | S-ino R. VAN ISTENDAEL |
| - " 25 " " " | : | S-ino E. DE COENE |
| | | S-ro L. DEMARE |
| | | S-ro F. PEETERS |
| - " 20 " " " | : | S-ro I. DURWAEL |
| - " 15 " " " | : | S-ino VAN GINDEREN-MARTENS |
| | | F-ino I. JACQUES |
| | | S-ro J. VAN EENCKHOVEN |
| - " 10 " " " | : | S-ino J. BLOCKMANS |
| | | S-ino H. DE SMET |
| | | S-ino J. NISSEN |
| | | S-ino I. BOLJAU |
| | | S-ino J. VAN DE WOUWER |
| | | S-ro J. ORBAN |
| | | Ges-roj VAN HERCK |
| | | S-ro R. GEIVAERTS |
| | | S-ro L. VERVECKEN |
| | | S-ro P. DE SCHEPPER |
| | | F-ino Veerle FREDERICKX (10 jar-aĝa) |
| | | S-ro Peter TYTGAT (10 jar-aĝa.) |



Je vendredo 30-a de januaro okazis la dua parto de la ĝenerala jarkunsido, per prezentado de serio da lumbildoj de "la jaro en bildoj", pri kio okazis dum 1980.

-------

La 20-an de januaro forpasis Frans GOOVAERTS, bofrato de nia ĝenerala kasisto kaj membro de LA VERDA STELO de antaŭ 25 jaroj. S-ro GOOVAERTS normale estus honorigata dum la ĝenerala kunsido de la 23-a de januaro, tago de sia enterigo. Al la vidvino Goovaerts, al nia amiko Jules Verstraeten kaj al la parencaro de la forpasinto , niajn plej sincerajn kondolencojn.

Sekve al la forpaso de sia edzo, S-ino Goovaerts, grave malsaniĝis kun la sekvo ke amiko Jules dediĉu plej grandparte sian tempon al ŝi, tiel ke li provizore ne plu povas partopreni en la kutima Esperanto-vivo.
Ni deziras al la malsanulino baldaŭan resaniĝon kaj al nia kasisto la necesan kuraĝon por elteni, kun la espero kiel eble plej rapide revidi lin en niaj rangoj.

--------

EDEGEM

La 29-an de januaro naskiĝis al Ges-roj WYCKMANS, prezidanto de la Edegema E-ogrupo, dua filino - An.
Plej sincerajn gratulojn al la gepatroj kaj,al la novnaskito, sanon kaj prosperon.

------

F.E.L.

F.E.L. okazigos sian ĉi jaran ĝeneralan jarĉefkunvenon je sabato 14-a de marto en"Kasteel van Ham" en Steenokkerzeel.

La kastelo estas senpage metata je la dispono de F.E.L. de la Ministerio pri Nederlanda Kulturo.

Ankaŭ tagmanĝi eblas je tre modera prezo : BF 125.
Tamen necesas sin anonci antaŭe ĉe la sekretario de F.E.L..

La estraro alvokas al kiel plej grandnombra partopreno, ĉar tiel ni montros ke ni aprezas la geston de la Ministerio kaj pruvas samtempe ke la Esperanto-movado en realeco estas grava parto de la Kultura vivo en nia lando.

------

La antaŭaj anoncitaj KADROKURSOJ nun estas defintive pretaj. Jen la programo :

| | | | |
|---|---|---|---|
| - 25 04 1981 | - (alir-) ekzameno pri lingvokono | | |
| - 23 05 1981 | - metodiko kaj didaktiko. | La kurson gvidas | Marc DEMONTY |
| - 20.06.1981 | - historio kaj literaturo. | " " | Fernand ROOSE |
| - 26 09 1981 | - paroltekniko j : | " " | Paŭl PEERAERTS |
| - 24 10 1981 | - komunikado. | " " | Anne TILMONT |
| - 28 11 1981 | - " | " " | " " |

Informoj kaj enskribiĝoj en ESPERANTO CENTRO, Arsenaalstrato 5, B-2000 ANTVERPENO.

U.K. 1982 - letero de la sekretario.

Karaj Samideanoj,
En nia novembra letero, ni anoncis la organizadon de la 67-a Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno, julio 1982.
La unuaj organizaj aktivecoj jam komenciĝis kaj la statutoj de la "asocio sen profitdona celo" aperis en la ŝtatgazeto de la 15-a de januaro. Nia reĝo jam akceptis esti la "alta protektanto" de la kongreso.
Hodiaŭ ni deziras fari alvokon al ĉiuj esperantistoj por helpi al konstutuo de la garantia kapitalo, devigata de art. 28 de la kongresa regularo : "En la komenco de la kongresa laboro, L.K.K. starigas Garantian Kapitalon por kovri eventualan deficiton. La Garantia Kapitalo estu minimume 5.000 ned. guld."

Tiuj kiuj konsentas helpi nin, devos subskribi jenan deklaracion :
" .... deklaras ke li/ŝi estas preta garantii por la 67-a Universala Kongreso de ESperanto la sumon de ... ned. Guld. aŭ egalvaloro. La garantiita sumo aŭ pocento, laŭ proporcio, estos pagita al L.K.K. nur en okazo de deficito."

Estas do klare ke vi NE devas pagi nun, verŝajne eĉ neniam. Estas nur promeso pagi SE la kongreso postlasas deficiton.

Vi povas sendi vian deklaracion rekte al L.K.K. (minimuma sumo 25 guld.) aŭ subskribi garantiformularon po 25 gld. kiujn la L.K.K. posedas kaj povas havigi al la grupaj kasistoj en libreto de 50 formularoj.

Ni atendas simpatian kaj konkretan reagon kaj anticipe elkore dankas.

Sincere via,
Roger De Schepper, sekretario.

-----------

KALMTHOUT

Je sabato 28-a de februaro, 3o-o da kuraĝuloj spitis la aĉan veteron kaj, tra torenta pluvo, faris la jam tradiciiĝintan "promenadon de la Amikeco" nun de Berendrecht al Zandvliet, tra belega natur-regiono, malgraŭ la "diluveto".

Antaŭtagmeze elektiĝis la Geambasadoroj de la Internacia Amikeco, nome

- Ambasadorino : F-ino Lief CHRISTIAENSEN, Risschotlei 2, B-2153 ZOERSEL

- Ambasadoro : S-ro Gerardo Di Paola, Achter de Kerk 15, NL-2801 JX GOUDA.

Al la elektitoj ni deziras multe da ĝojo pri la titolo, kaj la necesan kuraĝon por la plenumado de la Geambasadoraj taskoj.

---------

ESPERANTO POR INFANOJ

Infanoj povas praktiki Esperanton, sendante leterojn, verkaĵetojn ktp. al :

- KASTORA KLUBO DE ESPERANTO, Junulara Kulturdomo
ul. Deotymy 37
PL-01-44 WARSZAWA, Pollando.

Ili ankaŭ povas korespondi kun

- GEUNKLOJ ESPERANTISTAJ , p/a J.H. SULLIVAN, 3 Berwick Avenue
URMSTON, Manchester
Gr. Br. M31 1PS

-----------

**SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ (5-a sesio)**
**UNIVERSITATO DE LIEGO (BELGIO)**
**05-19 de julio 1981**

Petu detalajn informojn kaj aliĝilon ĉe:

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ
Boite Postale 9, B - Liège X Belgio

Bijlage bij
Aldono al ESPERANTO - APR. 1981

Verantwoordelijke
Respondecas Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

# ESPERANTO EN BELGIO

A.P.E.

El la protokolo pri la estrarkunsido de la 3-a de marto 1981, ni retenas ke A.P.E. speciale atentas pri :

- koresponda kurso
- turismo kaj traduko de turismaj tekstoj
- organizo de "rebat-servo" kadre de la gazetara servo
- starigo de komisiono pri kulturo, sekve al la alvoko de D-ro RAGNARSSON

Plie, A.P.E. ĝiros BF 10.000 al S.U.K.

-----

KORESPONDA ESPERANTO-KURSO
Victor Raskinstrato 20
4000 LIEGE

Enskribiĝo : BF 500 ĉio enkluzive.

B.E.F.

Belga Esperanto-Federacio okazigos sian 2-an Federacian Kongreson en Bruselo, verŝajne dum la unua semajnfino de Oktobro 1981.

La Brusela grupo okupiĝas pri la aranĝo.

Pliaj informoj sekvos.

F.E.L.

La ĉijara ĝenerala jarĉefkunveno okazis do la 14-an de Marto en Kastelo de Ham en Steenokkerzeel.

Ĉu pro malfacilaj atingeblecoj (?) kunvenis nur 30-o da personoj.

La kunsido okazis en tre bela "kavalir-salonego". Manĝi kaj trinki oni povis en same belaj ejoj en la subtera etaĝo.

Kvankam la ĉeestantaro ne estis tre multnombra - kuraĝige estis, ke pli ol 1/3 de ĉeestantaro estis junuloj ! -, la kunsido tre bone sukcesis.
Jena estraro elektiĝis :

- prezidanto : Edward SYMOENS
- vic-prezidanto : Roger DE SCHEPPER
- kasisto : Jules VERSTRAETEN
- sekretario : Jan BOVENDEERD
- membroj : René BUDTS, Fernand ROOSE, Guido SCHROEYERS kaj Kristin TYTGAT
- provincaj kontaktpersonoj : Brabanto : MITI HENQUINEZ
  Limburgo : Guido SCHROEYERS
  Okcident-Flandrujo : Fernand ROOSE

Rilate al Orient-Flandrujo decidiĝos okaze de ĝenerala provinca kunveno, verŝajne en Majo.

F.E.L. nun estas reprezentata en 44 komunumoj. Krome estas kunlabor-konsento inter F.E.L. kaj B.E.F.A. (Fervojistoj), F.A.B.E. (Blinduloj), I.K.U.E. (Katolikoj) I.L.E.I. (Instruistoj) kaj Laborista E-grupo "Antaŭen" Deurne.

F.E.L.-estraro esperas, ke la planitaj kadrokursoj kondukos al pli bona interna organizado, pli bonaj publikaj rilatoj, varbado ktp. La rezultoj indikos la vojon sekvendan, ĉu doni al la kursoj "permanentan karakteron" aŭ ĉesi.

Por la ekzameno sin anoncis 30-o da personoj.

-----

ANTVERPENO

La 24-an de Aprilo 1981, LA VERDA STELO okazigos sian unuan kunvenon en la nova ESPERANTO-DOMO, Frankrijklei 140. La salono estos malferma ekde 18.00 h.
Eblos vespermanĝi.

Je sabato 25-a de Aprilo ekde la 10.00 h. : preparo al kaj ekzameno pri lingvokono, kadre de la de F.E.L. planitaj kadrokursoj.
Eblos lunĉi.

Dimanĉon 26-an de Aprilo kaj ekde tiam la salono estos alirebla ĉiu-dimanĉe de 10.00 - 13.00 h.

Dimanĉon 10-an de Majo : solena malfermo de la klubejo kun akcepto.
Kompreneble, ĉiu estos bonvena !

-------

BRUĜO

La solenan malfermon de la Semajno de Internacia Amikeco en la gotika salonego de la urbo-domo partoprenis 130-o da personoj.
Paroladis Rektoro BRUGMANS, la skabeno pri kulturo kaj S-ro F. ROOSE.

Rektoro Brugmans substrekis la neceson de Esperanto kaj la persistemon de la movadanoj.

Inter la honoraj gastoj, rimarkiĝis S-ro G. MAERTENS, Prezidanto de U.E.A.

La urbo oferis honoran vinon al ĉiuj ĉeestantoj.

------

GENT

LA PROGRESO anoncas plian serĉpromenandon por Esperanto-gelernantoj je 30 05 81.
Informoj : René BUDTS, Fortlaan 64, 9000 GENT tel. 091/21 40 15.

-------

HASSELT

Je sabato 16-a de Majo 1981 okazos en la Hasselta Kulturdomo, ĝenerala provinca kunveno por Limburgaj Esperantistoj.
Okaze de tiu kunveno estos festata la jubileo pri 50-jara esperantismo de Pastro A. BECKERS, Honora Prezidanto de I.K.U.E.
P-ro Beckers ankaŭ estas unu el la motoroj de la Esperantomovado en Limburgo, provinco kie antaŭ 5-o da jaroj ekzistis nenio rilate al Esperanto, krom eble kelkaj individuaj membroj kaj kie nun ekzistas 4 (eble jam eĉ 5) apartaj grupoj.



-----

KALMTHOUT

En Majo (ĝusta dato ?) LA ERIKEJO festos sian 10-jaran ekziston.
Gratulojn !

-----

LEUVEN - ESPERANTO 2000

Pri la Semajno de Internacia Amikeco, kiu (kiel kutime) bonege sukcesis, raportis pluraj gazetoj, inter kiuj per sufiĉe longa artikolo, "HET VOLK" (27 02 81), "HET NIEUWSBLAD" (25 02 81) kaj "DE AANKONDIGAAR" (19 02 81).

Ĉefe la ekspozicio estis la rigard-allogilo kiu altiris multe da interesitoj.
Okazis ankaŭ diversaj prelegoj, kunlabore kun aliaj Internaci-tendencaj organizoj.

------

ESPERANTO 2000 anoncas, ke ekde Oktobro 1981 VTB/VAB verŝajne organizos propranome Esperanto-kurson en Leuven/Heverlee. Sufiĉus ke estu 10 enskriboj.

------

Menciinde ankaŭ estas, ke ESPERANTO 2000 organizos la Internacian Junularan Kongreson en 1982. Malgraŭ tiu grandega tasko, tamen denove okazos serĉpromenandon verŝajne en Julio.

-------

De 28 - 31 05 81, ESPERANTO 2000 partoprenos la Lovenajn "Cambrinus"-festojn per ekspozicibudo.

-------

MORTSEL

ESPERANTO MORTSEL finfine trovis taŭgan kunvenejon en la salono de Hof VAN RIETH.

Interesa punkto estas, ke la kunvenejo eŝtas senpaga.

La afero estas des pli interesa, ke antaŭlonge finiĝos la E-kurso kaj ke do "post-la-kurso" povos esti organizita.

-------

STOKKEM

La 6-a Internacia Somer-pikniko okazos ĉi jare je sabato 27-a de junio, kiel kutime ĉe la Moz-bordo (landlimo).

Ĉi foje la partoprenontoj ne kunvenu en la centro de la vilaĝo, sed jes ĉe

la piknikejo mem, t.e. apud la pramo transmoza.

Ĉi foje ankaŭ la promenado ne okazos en Belgio, sed sur Nederlanda teritorio, tra belega natur-regiono.

Kunveno je la 10-a horo matene, pikniko ĉirkaŭ 12.30 h. La posttagmeza programo ankoraŭ ne estas konata (estas diversaj eblecoj), sed ĝi estos interesa, pli interesa ol la antaŭajn jarojn!

-------

Eldonejo SONORILO

SONORILO komunikas :

- "Tinĉo, la Krabo kun la oraj Pinĉiloj " estos havebla plej frue en Majo. Antaŭmendoj estas atendataj ĝis 11 05 81.

- ESPERANTO BILDVORTARO kaj PLENA ANALIZA GRAMATIKO esta elĉerpitaj, sed denove haveblaj en Majo

- SONORILO estas peranto de HEROLDO DE ESPERANTO (jarabono 440 BF) kaj de EL POPOLA ĈINIO (abono 1-jara : 180 F.; 2-jara : 300 F.; 3-jara : 450 F.)

--------

NEKROLOGO

Je 05 04 81 forpasis, en la aĝo de 56 jaroj, S-ino Dora VEREECKEN, fratino de la Direktoro de Eldonejo SONORILO.

Al la familio VEREECKEN kaj parencaro niajn sincerajn kondolencojn.

-------

ESPERANTO DE UEA

En ESPERANTO de februaro 1981 ni legis inter alie :

".. kvankam Belgio estas tute proksima al nia redakcio, novaĵoj de tie vojaĝas al ni longe ..."

Ĉu ŝerco ? La ESPERANTO-redakcio, kiel cetere ankaŭ HEROLDO DE ESPERANTO, ricevas ĉiumonate ĉiujn eblajn informojn kaj komunikojn tiel de B.E.F., kiel de F.E.L., kiel supozeble ankaŭ de A.P.E.

Ĉu do ni konkludu, ke niaj kolegoj en Rotterdam fidele kaj senhezite klasifikas niajn sendaĵojn "vertikale" (= paperkorbe)?

-------------

Maandblad
Monata bulteno

Jaargang
Jarkolekto 1 N° 1 mei
majo 1981

# ESPERANTO EN BELGIO

Verantwoordelijke
Respondecas
Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

Antverpeno

La unua kunveno en la nova Esperanto-domo okazis vendredon 24-an de aprilo.

La kunvenejo, konsistanta el kunsidejo, restoracieto kaj kuir-ejo, estis plenplena de kontentaj, gajaj, feliĉe ridetantaj "Verd-stelanoj". Ne necesas substreki, ke la plej feliĉaj estis Ges-roj Durwael, kiuj dum pluraj semajnoj, kune kun amikoj kaj gemembroj de LA VERDA STELO, laboregis por pretigi la salonon.

Ili bonege sukcesis kaj ni ne povas sufiĉe laŭdi ilin.

Dum tiu ĉi unua kunvenvespero enkasiĝis BF 34.000 da donacoj ...

Sabaton 25-an de arpilo, jam je la 10-a horo matene, la salono denove estis plena, ĉi foje de la kandidatoj ekzamenontoj (vidu alie).

Vespere ekde la 8-a horo, la salono por la tria fojo pleniĝis. Nun estis la kunhelpantoj en la pretigo de la salono, kiuj estis invititaj de la prezidanto por danki ilin pro la kunlaboro. La prezidanto same profitis la okazon por pretigi dejorkalendaron por la venontaj monatoj. Ne forgesu ni, ke la kunvenejo estos malferma ĉiun vendredon ekde la 18-a horo, kaj ĉiu dimanĉe de la 10-a ĝis la 13-a horo. Krome, F.E.L.-estraro kunvenos ĉiumonate, la 2-an sabaton, kaj okazos tie ankaŭ la kadrokursoj, la 4-an sabaton de ĉiu monato. Kompreneble, ĉar eblos manĝi kaj trinki, necesas havi dejorantojn. Tial do ...

Personoj kiuj havos tempon kaj kiuj pretas helpi en tio, bonvolu kontaktiĝi kun Ivo Durwael, P. Gilsonlaan 5, 2520 Edegem - 031/40 30 92.

La kunvenejo estos solene inaŭgurita de la prezidanto de UEA, en sia propra moŝta persono, dimanĉon 10-an de majo je la 14-a horo, cetere okaze de la Antverpena Tago de la Amikeco.

LA VERDA STELO atendas multe da vizitontoj.

FEL-kadrokursoj.

La ekzamenon pri lingvokono, fakte testo pri la kapablo por partopreni la kadrokursojn, partoprenis 18 personoj. Ĉiuj sukcesis por partopreni la kursojn, dum nur kelkaj ricevis konsilojn por plia studo kaj/aŭ praktikado.

La unua studotago okazos do sabaton 23-an de majo ekde la 10-a horo en la nova Esperanto-domo. Temo : metodiko kaj didaktiko. La kurson gvidos S-ro Marc Demonty, prezidanto de BEF.

ATENTON !

Personoj kiuj ne povis partopreni la ekzamenon je sabato 25-a de aprilo k. tamen volas partopreni la kadrokursojn, povos sin anonci 1 horon antaŭ la komenciĝo de la kursoj por fari la ekzameneton.



Aliflanke, personoj kiuj jes partoprenis la ekzamenon, sed ne povos ĉeesti unu aŭ plurajn studotagojn, sciigu tion al la oraganizanto (J. Bovendeerd). Se estos sufiĉe da interesitoj, la organizado de nova serio da kursoj estos prikonsiderata.

Fine, la ekzameno/kursoj etsas alireblaj al ĉiu, se nur elmontriĝos ke la lingvokono estas sufiĉe bona.

La laborlingvo cetere estos Esperanto.

Welkenraedt.

Kadre de lerneja festo, la klubo el Welkenraedt organizos Esperanto-ekspozicion la 30-an kaj 31-an de majo.

Personoj kiuj tiam gastigas eksterlandajn esperantistojn multege ĝojigus la organizantojn se ili vizitus la ekspozicion kun siaj gastoj. Por pli da efiko ili bonvole sin anoncu ĉe S-ino Maria Grela, tel-o 087/88 08 32.

Ĝenerale.

SOBRA POR ALIULOJ (SOBER VOOR ANDEREN).

Ricevantoj de ESPERANTO PANORAMA (Nederlandlingva bulteno) povis legi el la marta/aprila numero artikolon pri "Bona Espero" en Brazilo. En tiu artikolo ESPERANTO PANORAMA pledis por la kunmetado kaj sendado de paketoj al "Bona Espero".

Jen por la okazo la adreso : BONA ESPERO"
Fazenda Escola
BR-77260 A. PARAISO, Gojas, Brazilo.

Pretas prizorgi la sendadon F-ino Gerd JACQUES, p/a Esperanto-Centro Arsenaalstrato 5, 2000 Antverpeno.

Tamen la sendokostoj estas tre altaj : BF 650 por paketo de 20 kg. kaj tial oni petis mon-helpon.

Sekve al tio sin anoncis, tute neatendite, Asocio sen Profitdona Celo SOBRA POR ALIULOJ, St. Ritastraat 32, B-3900 LOMMEL por kovri parton de la kostoj !

Laŭ klarigoj de F-ino Gerd Jacques, SOBRA POR ALIULOJ estas asocio, kiu fondiĝis sekve al la malboniĝanta ekonomia situacio. Ĝi konsistas el familioj kiuj decidis vivi sur-baze de minimumaj enspezoj kaj dediĉi la monon kiun ili tiel ŝparas al ... aliuloj, helpbezonantoj. Komenciĝinte sesope; la asocio jam nombriĝas 2000-o da familioj.

Jen do homoj kiuj sen brua reklamado, montras la vojon al ĉiuj pedantaj mond-plibonigantoj.
Ĉapelon !

SONORILO

Libroservo SONORILO atentigas pri tio, ke ili peras :
- HEROLDO DE ESPERANTO - jarabono BF 440,-
- EL POPOLA ĈINIO - abono 1-jara : BF 180,-; 2-jara : BF 300,-; 3-jara : BF 450,-.
- MONATO : jarabono BF 800,-.
- MONDA KARUSELO : BF 130,-.

Kompleta listo pri la haveblaj libroj estas akirebla kontraŭ poŝtmarko de BF 9,- (por Belgoj) aŭ 1 Int.Resp. Kupono (por eksterlandanoj)

Specialaj ofertoj de la monato :
- LA FARAONO de Prus : BF 100,-.
- AMUZAJ DIALOGOJ : BF 150,-.

Organizontoj de kursoj bonvole mendu la instrumaterialon 1 monaton antaŭe.

Anstataŭ la Prisma-vortaro de Drs A.J. Middelkoop - komplete elĉerpita- estas havebla nun, kontraŭ BF 80,- + sendokostoj, vortareto de A. DEWIT.

SONORILO, Doornstrato 22, B-2610 WILRIJK. Kontnumero : 000-0152140-44.

TRILANDA RENKONTIĜO Belga/Germana/Nederlanda.

La 50-a 3-Landa Renkontiĝo okazos la 30-an kaj 31-an de majo 1981 en MONSCHAU, FRGermanio.
Info kaj aliĝo : ESPERANTO-GRUPO AACHEN, p/a Wolfgang BIENEN, Eynattenstr. 56, D-5100 AACHEN.

TURISMO EN LA NATURO Esperant-lingva

S-ro ARNLJOT KYLLINGSTAD, N-4390 HELLELAND, Norvegio serĉas kunlaborantojn en nia lando por organizi "Turismo en la Naturo"-n.

PETO EL POLLANDO.

Por helpi al KIELCA "Esperanto-Kulbo ĉe Vojevodia Kulturdomo, Sciegiennystrato 6, PL-25-953 KIELCE, Pollando" festi sian 20-jaran ekziston, petate estas sendi kiel eble plej multe da leteroj kaj esperantaĵojn.

-----------------

Maandblad
Monata bulteno

Jaargang
Jarkolekto 1 N° 2 jun. 1981

# ESPERANTO EN BELGIO

Verantwoordelijke
Respondecas

Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

A.P.E.
-----

La estraro de APE alvokas al volontuloj por partopreni komisionon pri kulturo, sekve al peto de D-ro Ragnarsson, delegito pri kulturo de UEA.

Interesitoj sin anoncu al la sekretario, S-ro Tholet.

F.E.L.
-----

En akra kontrasto kun la antaŭaj provincaj kunsidoj, kunvenis en Gento, je sabato 9-a de majo, nur 6 personoj el la Orient-Flandra provinco. La kontrasto estis des pli granda, ĉar la Orient-Flandroj ŝatas sin konsideri el la plej aktivaj Esperantistoj.

Malgraŭ la ŝajna (?) malinteresiĝo, la kunveno ne malsukcesis, kvankam FEL-estraro devis rehejmeniri sen firma rezulto.

Sed
kiom ajn malkuraĝiga ankaŭ povis esti la kunveno mem, tamen estis firma promeso, ke nova grupo estos fondita en Lokeren.

Ni kun intereso sekvos la evoluon.

--------

Cele al plibonigo de la financa situacio, FEL-estraro kreis "ŝpareblecon" por siaj membroj.

Estonte eblos fari FIKSDATAJ MONDEPONOJ de miminume BF 5000 por minimume 2 jaroj je 6 %-a rento. Tio okazos laŭ la ekzemplo de UEA.

Deponante monon al FEL, vi do ne perdos en la operacio, ĉar la depono alportos 6 % da rento, kiel en normala ŝparbanko.

Tiamaniere vi povos helpi al plia disvastigo de nia movado en Flandrio, ebligante la eldonon de libroj, informbroŝuroj k.s.. Tio estas tre grava, certe nun, ĵus antaŭ la Unuiversala Kongreso en 1982.

Petu la regularon al Esperanto-Centro, Arsenaalstrato 5, 2000 Antwerpen.

--------

FEL ankaŭ eldonos antaŭlonge broŝuron "ESPERANTO, KION MI POVAS FARI PER TIO." La preparo nun estas en sia fin-stadio.



Ekde kiam la teksto estos definitive akceptita, la broŝuro estos tradukite en la nederlandan, i.a. prepare al la U.K. 1982 en Antverpeno.

La celo de la broŝuro estas enmeti ĝin en la instruprogramon de elementaj kursoj por ke la lernantoj estu (iom pli bone) motivitaj ĉe la fino de la kursoj.

Nacilingve ĝi servu kiel propagandilo.

En la projekto kunlaboris diversaj personoj kaj landaj asocioj. La plej grava kunlaboro venis de UEA kaj de Esperanto-Centro Nederlando.

Personoj kiuj interesiĝas en la projekto, sin anoncu ĉe Esperanto-Centro en Antverpeno.

--------

ANTWERPEN
---------

10 05 1981

La solena inaŭguro de la nova ESPERANTO-DOMO estis grandega festo. Tiom da interesitoj sin prezentis, ke la ejo ne povis enteni ĉiujn.

Alparoloj okazis nome de UEA, fare de ĝia prezidanto S-ro Gregoire Maertens, de Institucio Hodler '68, fare de ĝia prezidanto S-ro Woessink, flanke de BEF, nome de ĝia prezidanto S-ro Marc Demonty kaj de Esperanto-Centro fare de ĝia direktoro, S-ro P. Peeraerts, kiu ligis al sia paroladeto la gratulojn kaj dezirojn nome de LA VERDA STELO.

Krom multe da bondeziroj kaj gratuloj al la prezidanto de LA VERDA STELO kaj al lia stabo, estis floroj por S-ino Durwael (prezidanto-edzino) kaj al pluraj malnovaj membrinoj.

La de LVS oferita vino bonege gustis kaj zorgis por gaja etoso.

-------

Neevitebla flanka aktiveco ...

... sufiĉas ke Esperantistoj, estraranoj de la movado sin renkontiĝu, por ke estu kunsido ... eĉ en plej maleblaj cirkonstancoj.
Ankaŭ nun okazis estraranaj kunsidoj, en la supra etaĝo de la ankoraŭ nekompleta parto de la domo, nome de Institucio HODLER kaj FEL kaj LVS.

BANNEUX.
-------

Je 12-a kaj 13-a de septembro okazos en Banneux la KVINA INTERNACIA ESPERANTISTA PILGRIMADO AL LA VIRGULINO DE LA MALRIĈULOJ en Banneux.

Jen la programo:

Sabaton 12-an de septembro :

17 h. : akcepto de la jam alvenintoj
18 h. Rozario en Esperanto
18.30 h. vespermanĝo
19.30 h. lumbildoj pri la aperoj de la Virgulino.

Dimanĉon 13-an de septembro :

8-a h. matenmanĝo
9-a h. akcepto kaj interkonatiĝo
9.30 h. bonvena kafo
9.45 h. preparo de la kantoj kaj preĝoj por la Di-servo
10.15 h. grupa vizito de la Kapelo kaj la Gracfonto
11 h. Eŭkaristio sub plena ĉielo
12 h. tagmanĝo
13.30 h. rozario
14 h. vizito de la Kapelo de Sankta Mikaelo kaj Krucvojo
15 h. beno de la malsanuloj
16 h. ferma kunveno
17 h. oficiala fermo de la pilgrimado.

Partopreno en la kostoj : BF 150,-

Info : P-tro L. Bourdon, 7, Avenue Salomon, F-59800 LILLE, Francio
Sacerdoto L. Muller, 207, rue F. Lefebvre 4420 Rocourt, Liège.

--------

Bruĝo
-----

La tri bruĝaj Esperant-grupoj kune prizorgos Esperanto-standon dum la borso "HOBBY '81" de 11 - 20 septembro en la Borshalo, Beursplein, Brugge.

Ĉiuj tien !

Info kaj kontakto : tel. 050/59 95 86

---------



HASSELT
-------

Je sabato 16-a de majo, la Kultura Centro en Hasselt estis la sceno de - kvankam ne tro multnombra, tamen tre agrabla - ĝenerala kunsido de Esperanto-Limburgo, honore al ĝia honora prezidanto Pastro A. BECKERS, kiu festis sian oran jubileon de Esperantisto.

Post parolad(et)oj de S-ro Christiaens, prezidanto de ESPERANTO LIMBRUG, kaj de S-ro Symoens, prezidanto de FEL, responditaj de P-tro Beckers mem kadre de " raporteto " pri sia esperanta vivo, okazis festkunsido en la restoracio de la Kultura Centro.

Ni esperas ke P-ro Beckers estos kontenta pri la kunveno kaj certe ankaŭ pri la donaco, kiun li ricevis el la manoj de S-ino Christiaens.

Ni tamen bedaŭras kun li, ke ne ĉiuj Limburgaj membroj trovis la tempon por veni kaj saluti sian honoran prezidanton en tiel grava kaj malofta momento.

LIEĜO
-----

La Lieĝa Esperanto-klubo disponigas al la partoprenantoj de la klubvesperoj diversajn aĵojn, kiel Esperanto-insignojn, korespondmaterialon, vortarojn, lernolibrojn, kasedojn ktp.

La klubo ankaŭ abonis por siaj membroj la revuojn MONATO kaj KONTAKTO.

------

MORTSEL
-------

La kursanoj de Mortsel sin trovis antaŭ fermita pordo kiam ili sin prezentis por la kurso je mardo 19-a de majo. La Ateneo, sen ia averto,finis siajn vesperkursojn kaj ne plu allasis la E-okursanojn.

Feliĉe oni ne tro malfacile trovis alian ejon, tiel ke la lastaj kurso-vesperoj povos ankoraŭ okazi,sed venonte je dimanĉo-antaŭtagmeze de la 10-a ĝis la 12-a horo en HOF VAN RIETH
Molenlei 68
M O R T S E L

Estas tie bela salono malantaŭ la trinkejo. Ĝi tamen estas alirebla nur tra la trinkejo. Tio tamen neestos malhelpo !

STOKKEM
-------

ESPERANTO-STOKKEM sin preparas al ŝia 6-a Internacia Somerpikniko je sabato 27-a de junio.

Espereble la vetero ĉi jare "taŭgos", ĉar la mirteloj denove abundas en la arbaro.

Do, interesitoj ne nur avertu nin ĝustatempe nepre antaŭ 20.06.81 ! pri sia partopreno (por helpi al ni prepari la manĝaĵojn) sed ankaŭ alportu la necesajn ujojn por la plukotaj mirteloj !

------

SONORILO
--------

La libroservo SONORILO memorigas la fakton ke kompletaj listoj pri lern- kaj legolibroj, samkiel pri vortaroj ktp. estas haveblaj kontraŭ BF 18 da poŝtmarkoj.

SONORILO ankaŭ havas plian bankkontnumeron : 320-0342460-23.

---------

Informilo

Monata revuo de F L A N D R A E S P E R A N T O - L I G O
Maandblad van V L A A M S E E S P E R A N T O - B O N D

Jarkolekto / Jaargang N° 1 majo / mei 1981

Verantwoordelijke / Respondecas Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

---

Jen kiel aspektas la "kapo" de la unua numero de la nova inform-bulteno de FEL.
"Informilo" estas fakte destinita al la kadromembroj de FEL, sed se estas personoj kiuj volas sekvi la evoluon de la movado, ili povas aboni la revueton por BF 100,- pagendaj en la konton 001-0073007-42 de Jan Bovendeerd, 2510 MORTSEL, kun la mencio "abono al INFORMILO"

--------------



FEL-KADROKURSOJ
--------------

La unua studotago el la serio "kadrokursoj" okazis do je sabato 23-a de majo. Ĉeestis 12 el la 16 enskribintoj. La 4 malĉeestantoj estis vere malhelpataj kaj pli ol verŝajne partoprenos la duan serion.

Laŭ la unuaj reagoj, la kurso estis tre kontentiga.

Ĉu ni bone komprenis, ka la kursgvidinto, S-ro Demonty, surpaperigos la ĉeflinioj ?

Laŭdinda decido !

La dua studotago okazos sabaton 20-an de junio, ekde la 10.00 h.
Temo : Historio kaj Literaturo.
Kursgvidanto : Fernand Roose.

La kondiĉoj restas : tiuj kiuj volas ankoraŭ partopreni, sed ne ekzameniĝis, povas sin prezenti unu horon antaŭ la komenca horo.

-------


FEL-estraro okazigos sian lastan kunsidon antaŭferian je sabato 13-a de junio 1980 en la Esperanto-domo en Antverpeno.
Tiu ĉi kunsido estos la unua kiu okazos en la nova domo.
Pri ĝia rezulto legu en "INFORMILO".

------------------

## M A G I A Ŝ T U P A R O

Per la ĉi subaj difinoj serĉu - horizontale kaj vertikale - la samajn vortojn por korekte plenigi la kvadratojn de la Ŝtuparo :

1. artiko de homa korpo (R)
2. vaporiĝema fluidaĵo (R)
3. familiano
4. nomo de birdo
5. batalejo (R)
6. prilaborita felo
7. nomo de floro (R)
8. ruinrestaĵo
9. nomo de birdo (R)
10. valori (R)



Noto : (R) post la difino signifas ke la trovota vorto estas radiko.

La solvon sendu al S-ro Roger ISERENTANT
St. Pieterskerkstraat 61, B-8000 BRUGGE

Maandblad
Monata bulteno

Jaargang
Jarkolekto 1 N° 3 jul/aug 1981

# ESPERANTO EN BELGIO

Verantwoordelijke
Respondecas

Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

D.E.F.

Belga Esperanto-Federacio denove kongresos ĉi jare, la 3-an kaj 4-an de oktobro en la Kultura Centro, Fortstrato 35 A, 1060 Burselo.

Niaj Bruselaj amikoj klopodis kaj sukcesis trovi novan (?) kongres-formulon, nome ne nur kunvenoj, sed ankaŭ kaj samtempe kromprogramoj por ne kunsid-ŝatantoj.

Vidu en aparta folio la provizoran programon + aliĝilon kaj konvinkiĝu pri la proponoj de la Bruselanoj.

Se iel eble, partopreno estos senpaga. Oni eĉ ekzamenas la eblecon je repago de la transportkostoj al tiuj kiuj venos de malproksime (ekster la provinco Brabanto)

Ĉu finfine oni trovis tie bonan formulon por estontaj kongresoj ?

Ni esperas.

---

Jam ni aŭdis kelkajn plendojn, ke okazas nun nur unu landa kongreso jare. Certaj inter ni trovas tion tro malofte, alivorte, ili volus renkontiĝi pli ofte...

Konsentite, sed kiel ? kaj kiu organizos ?

Ĉu eble la malgrandaj renkontiĝoj, kiel okaze de la Semajno de Internacia Amikeco, piknikoj ktp povus anstataŭi la mankantajn renkontiĝojn ?

Sugestoj estas bonvenaj !

F.E.L.

Kadrokursoj

La dua studotago en la serio de la kadrokursoj okazis sabaton 20-an de junio. La temoj ĉi foje estis, antaŭtagmeze : historio kaj posttagmeze : literaturo.

La gvidanto, Fernand Roose el Bruĝo, sukcesis laŭ agrabla maniero doni superrigardon super la historio, ne nur strikte pri la Esperana historio, sed de la "Internacia Lingvo" ĝenerale, inkluzive de aliaj projektoj.

Dum la posttagmezo li same agrable enkondukis la ĉeestantojn en la mondon de la literaturo.

Kompreneble la temoj estis tro vastaj por havi kompletan superrigardon. Tamen la kurso trafis sian celon : meti nin sur la bonan piston por ke ni mem povu trovi la bonan vojon por kompletigi niajn konojn pri historio kaj literaturo.

Denove pruviĝis, ke la organizado de la kursoj estis necesa plenigo de ekzistanta manko.

aldono al/bijlage bij ESPERANTO EN BELGIO jul/aug 1981

B E L G A E S P E R A N T O - F E D E R A C I O

D U A F E D E R A C I A K O N G R E S O

Datoj : 3-a kaj 4-a de oktobro 1981

Loko : 1060 BRUSELO, Fortstrato 35 A

Provizora programo

- Sabato 3-a de oktobro :
  - 10.00 h. interkonatiĝo
    - samtempe : BEF-estrarkunsido
    - Lingva ekzameno, rapidkurso
  - 12.00 h. tagmanĝo (300 F.) kaj/aŭ trinkaĵoj surloke
  - 13.00 h. omaĝa ceremonio en av. Zamenhof en Anderlecht
  - 16.00 h. sandviĉoj kaj trinkaĵoj en la kongresejo
  - 17.00 h. ĝenerala kunsido de APE
    - administrantara kunsido de FEL
    - kunsido de BEFA
    - Kunsido de ILEI
    - samtempe : prezentado de filmoj/videokasedoj
  - 19.00 h. muzik- kaj filmvespero - dancebleco
- D-manĉo 4-a de oktobro :
  - 09.30 h. ĝenerala jarkunsido de BEF
  - 12.00 h. manĝebleco en la ĉirkaŭaĵo
  - 13.30 h. ekskurso : gvidata vizito de la historia centro de Bruselo aŭ de muzeo

---

A L I Ĝ I L O

resendota antaŭ 15 09 1981 al Marc DEMONTY, Av. des Missionnaires 39 b.5
Missionarissenlaan
1080 BRUSELO

Nomo _______________________________

Profesio (nur por statistikaj celoj, do ne devige) ______________

Adreso _______________________________

Intencas partopreni :
- la tagmanĝon je la 3-a de oktobro jes/ne °
- la vespermanĝon je 4-a de oktobro jes/ne °
- la ekskurson al Anderlecht - sabate jes/ne °
- la lingvan ekzamenon jes/ne °
- la ekskurson de dimanĉo jes/ne °

Deziras tranokti :
- ĉe esperantistoj jes/ne °
- en hotelo jes/ne °

° indiku la deziraton.

Dato kaj subskribo.

ANTVERPENO

Internaciaj vesperoj.

Ekde septembro ĉiu dua vendredo de la monato estos okazo aŭskulti kaj paroli kun eksterlanda gastparolanto.
... Kaj ne nur tio ...
Vi ankaŭ povos ĝui agrablan restadon kaj komunan vespermanĝon ekde la 18-a horo en la restoracieto de la klubejo de LA VERDA STELO, Frankrijklei 140, Antverpeno.

LOVENO

Je dimanĉo 12-a de julio okazos en Loveno (Leuven) denove serĉpromenado, organizita de ESPERANTO 2000.

Foriro inter 10.00 kaj 14.00 h. ĉe la urbodomo, Granda Placo.

Inskribiĝo : BF 100,- + BF 75,- por aldona famili-membro.

Aljuĝo de la premioj : ekde 19.00 h. en "ZAAL DER HALLEN", Naamsestraat.

WELKENRAEDT

La ekspozicio, kiu okazis la 30-an kaj 31-an de majo bone sukcesis. Venis multe da interesitoj. Rimarkinde estas, ke sin prezentis membro de A.A.-klubo (Anonimaj Alkoholistoj) kaj petis, ke oni enkonduku Esperanton en la A.A.-klubon.

Ankaŭ ĵurnalisto de la gazeto LE JOUR montris multe da intereso por la ekspozicio kaj Esperanto.

ĜENERALE

Nekrologo.
Je 15-a de junio forpasis en Bruselo/Anderlecht S-ro Mertens, patro de nia kandidat-kadromembro Andre Mertens-Goossens.
Al la parencaro de S-ro Mertens, niajn plej sincerajn kondolencojn.

AGADO E 3 - ESPERANTISTOJ ESPERIGAS ESPERANTOJN

Agado E 3 ŝajnas al ni sufiĉe konata. Temas pri organizo kiu, pere de monkolketoj, helpas financi klinikojn por okulkuracado en Afriko.
La (jam) kvara projekto estas : okulkuraca pavilono kun operaci-ĉambro en NDOUNGUE, Kamerunio.

La de E 3 promesita sumo estis 100.000 Ned. gld. Je 01 05 1981 la kolektita sumo estis 97.209,49 gld.

La iniciatinto, S-ro Jacques Tuinder multe dankas al ĉiuj helpantoj kaj volonte

sendas sian informbultenon.

Info : Jacques TUINDER, Henegouwenlaan 35, NL-1966 RH HEEMSKERK, Nederlando.
Kontoj : PĈK : 10 20 100, Rabobanko Beverswijk : 107300990

EŬROPA VOJAĜO

La vojaĝo tra Eŭropo, planita de Esperanto Centro Aarhus, Danlando ne povos okazi ĉi jare.

Bedaŭrinde, ĉar jam kelkaj Belgaj esperantistoj estas preparintaj sin por akcepti kaj loĝigi ilin.

PORINFANA AMIKECA RENKONTIĜO

De la 1-a ĝis la 11-a de aŭgusto okazos en la Hungara urbeto Pâpa kaj organizita de Irlandano helpata de la Hungara registaro, Amikeca Renkontiĝo por infanoj 8 ĝis 13-jaraj.

Prezo por la 10-taga restado ĉio inkluzive (loĝado, manĝoj, ekskursoj ktp) : 1500 Forintoj = ± 2.000,- BF.

Vojaĝi tien estos facila por Belgoj, ĉar la organizanto aranĝos trajnan karavanon de el Oostendo - Bruselo - Kolonjo - Frankfurto - Vieno ...

Petu informojn ĉe Christopher FETTES, St. Columba's College, DUBLIN 16, Irlanda Respubliko.

Por gepatroj, kiuj volas akompani la infanojn sen partopreni la renkontiĝon, estos rezervita arbara hotelo en GEZAHAZA, proksime de PAPA.

Prezo por unu lito + matenmanĝo por la sama periodo estos ± 1.000 Forintoj aŭ ± 1.300 BF.

LASTAJ INFORMOJ

Je sabato 22-a de aŭgusto kunvenos en komuna kunsido la estaranoj de F.E.L. kaj F.L.E.J.A. por priesplori la eblecojn pri pli ŝtreĉa kunlaboro kaj la komunajn financeblecojn.

Maandblad
Monata bulteno

Jaargang
Jarkolekto I N° 4 sept. 1981

# ESPERANTO EN BELGIO

Verantwoordelijke
Respondecas

Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

Jen do la fino de la - esperble tre agrabla por ĉiuj - feriperiodo kaj la rekomenciĝo de niaj aktivecoj.

Ĉu vi ne forgesos enskribi vin en la 2-a Federacia Kongreso de 03 kaj 04 10 1981 en Bruselo? Vidu la ĉi kunan aliĝilon.

Al tiu kongreso okazos multaj kunvenoj por aktivuloj, dum estos samtempe ekskursoj por la akompanontoj.

Ek, do.

Ni same esperas revidi vin en Aubel, okaze de la baldaŭa Trilanda Renkontiĝo. Vidu pliajn detalojn en paĝo 4.

Intertempe FEL ankaŭ daŭrigos siajn kadrokursojn, ĉiufoje la 4-an sabaton de la monato.

FEL ankaŭ anoncas sian intencon reorganizi, nun ne plu la ligon, sed jes sian administradon. La afero pridiskutiĝos dum la BEF-congreso.

-----------

UK 1982

La 67-a Universala Kongreso alproksimiĝas gigantpaŝe kaj multege da laboro atendas. Ni supozas, ke ĉiu inter ni deziras ke ĝi bone sukcesos. Tamen mankas komfortoj.

Personoj kiuj,same kiel ni,esperas "bonan" kongreson kaj kiuj pretas iel kunlabori en la organizado,estas petataj kontaktiĝi kun S-ro Roger De Schepper, Doornstraat 22, 2610 WILRIJK. Tel 031/27 24 05.

----------

SONORILO - Libroservo.

Ĉar la katalogo fakte neniam povas esti kompleta, ĉar aperas libroj ĉiusemajne, SONORILO eldonos konstantan suplementon en la formo de periodaĵo "LAST' APERIS".

Kiu volas ricevi la periodaĵon, sendu al SONORILO 5 poŝtmarkoj de BF 8 por la sendkostoj. Bonvolu anonci vin antaŭ 20 09 1981.

Novaj abontarifoj :

Bonvolu noti la novan abonprezon de HEROLDO DE ESPERANTO, kiu nepre devis esti plialtigita ĝis BF 490,-
Novaj membroj, kiuj abonas sin antaŭ 20 10 1982 ricevos la revuon senpage ĝis fine de decembro 1981.

Kontoj : 000-0152140-44 kaj 320-0342460-23 ambaŭ nome de SONORILO.



UEA alvokas :

De 16 ĝis 18 10 1981 okazos en la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 179, NL-3015 BJ ROTTERDAM, Nederlando, Seminario pri Informado.

Partopreno estas limigita al 30 personoj, kiuj laboras en tri grupoj de ĉirkaŭ dek personoj kaj kiuj pritraktos :

- grupo I : iloj : pristudo/kreado de informiloj
- grupo II : vojoj : ellaboro de strategio kaj difino de la interrilatoj inter internaciaj, naciaj kaj lokaj laboroj pri informado.
- grupo III : projektoj : planado de informkampanjo.

Personoj kiuj volas, sed ne povos partopreni la seminarion, povos kunlabori kaj ensendi siajn proponojn, t.e. ilustraĵo(j)n/foto(j)n/ideo(j)n por faldfolio aŭ afiŝo; eseon pri strategio aŭ ideoj pri kampanjo, antaŭ 25 09 1981 al la Centra Oficejo.

Pliaj detaloj kaj aliĝiloj estas haveblaj ĉu ĉe la redakcio de ESPERANTO EN BELGIO, ĉu en ESPERANTO CENTRO, Arsenaalstrato 5, 2000 ANTWERPEN.

----------

Ni ricevis jenan leteron de YOUTH PUPPET THEATRE, INDIA.

Plezure ni prezentas al vi Junulara Pupteatro, Hinda Unio, la instituto por evoluo kaj disvastigo de pupteatraĵo.
Ni partoprenis en Internacia pupfestivalo en Usono, Pollando, Rusujo ktp. kaj estas invitataj ankaŭ en Francio, Jugoslavio.
Ni aranĝis Esperantan klason regule kaj jam produktis pupteatraĵon el la fama novelo de Rabindranath Tagore, nome "MALSATA ŜTONO".
Ni avide atendas prezenti pupteatraĵon en via lando kaj petas al vi bonvole aranĝi kelkajn ekspoziciaĵojn kie ni povus montri niajn programojn.
Tuj kiam ni aŭdos de vi, ni sendos pliajn detalojn.
Ni estas certaj, ke vi povos aranĝi la supre menciitajn ekspoziciaĵojn.
Frua respondo apreziĝos.
subskribis S.K. BISWAS, Honora Generala Sekretario.
YOUTH PUPPET THEATRE,INDIA
2, SEBAK BAIDYA STREET
CALCUTTA- 700029 : 47-6841

Personoj/grupoj kiuj intencas doni sekvon al tiu alvoko, bonvolu kontakti S-ron Biswas.

------------

## TRILANDAJ RENKONTIĜOJ

EŬREGIO REJNO-MOZO invitas al TRILANDA RENKONTIĜO en la urbeto AUBEL, geografia centro inter AACHEN (Germanio), LIEGE (Belgio) kaj MAASTRICHT (Nederlando) kaj alta turisma loko de la "Herva lando".

Ĝi okazos sabaton 19 09 1981 en Café PASTEGER
Place Nicolaï 31
AUBEL.

### P R O G R A M O

10.00 h. Malfermo de la akceptejo

10.30 h. Oficiala parto

Inaŭguro de Esperanto-Laborejo ("Atelier") fondata de la Provinco Lieĝo, kiel kontribuo al pli da kooperado en la sino de EŬREGIO

Prelegos kaj salutos i.a.:

- S-ro Robert REMOUCHAMPS, direktoro de la Kulturaj Aferoj de la Provinco Lieĝo, iniciatinto de la "Atelier-krejo"

S-ro Gregoire MAERTENS, prezidanto de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

S-ro Marc DEMONTY, prezidanto de BELGA ESPERANTO-FEDERACIO

en ĉeesto de altaj funkciuloj de la Provinco, de la urbo Aubel kaj apudaj komunumoj kaj de invitataj alilandaj reprezentantoj de Eŭregio.

12.00 h. Honorvino

13.00 h. Tagmanĝo en la kampara restoracio "Casse Croute" de la Abatejo du Valdieu

14.00 h. Ebleco viziti la Abatejon du Valdieu (Cistercia manaĥejo - fondita en la XIII-a jarcento) aŭ/kaj pitoreskan ĉirkaŭaĵon.

16.00 h. Reveno al Aubel por :

- vizito de la Laborejo (Ŝtatlernejo, kie komenciĝos Esperanto-kurso la 22-an de septembro)

18.00 h. Simpla vespermanĝo

sekvota de DISTRA VESPERO.

Kontaktadreso : Fredo BOSMANS,
route de Comblain 27
4183 FERRIERES (Xhoris), Belgio.

---

## 67a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN ANTVERPENO

1982 07 24/31

La 66a UK en Brazilio, kun 1750 partoprenantoj, finiĝis antaŭ kelkaj semajnoj. Ankaŭ la somerferioj ĉe ni por multaj nun finiĝas, kaj komenciĝas nova laborjaro.

La grandan celon, kiu postulos ĉiujn disponeblajn fortojn en nia lando dum la venontaj 10 monatoj, vi jam konas: la 67an UK de Esperanto en Antverpeno!

Ni deziras informi ĉiujn esperantistojn kaj simpatiantojn pri la jam farita laboro kaj samtempe lanĉi nepran alvokon al ĉiuj, kiuj aktive deziras kunlabori kun ni.

I. Kia estas la nuna situacio?

1. Kongresejo: la salonoj de la „Koninklijke Maatschappij voor Dierkunde"en Antverpeno (zoologia ĝardeno), apud la Centra Stacidomo, en la centro de la urbo.
2. La urbo Antverpeno promesis helpi nin sur pluraj terenoj; ĝi i.a. presigos por la Kongreso 20 000 esperantlingvajn faldfoliojn pri Antverpeno.
3. La Ĝenerala Komisariato pri Turismo donos la necesajn grandformatajn afiŝojn kun Esperanto-teksto.
4. Sabena faris ankaŭ kelkajn, bedaŭrinde tre limigitajn promesojn, rilate al la publikigo kaj senpaga transporto de presaĵoj.
5. Ĉiuj koncernataj direkcioj de la Ministerio pri Nederlanda Kulturo favore respondis al niaj petoj pri helpo kaj subvenciado.
6. Ni posedas informojn pri la antverpenaj hoteloj.

II. Kiuj estas la nunaj prioritatoj? TROVI MULTAJN KUNLABORANTOJN

1. Ni nepre devas konkrete esplori ĉiuspecajn loĝeblecojn en kaj ĉirkaŭ Antverpeno, ĉar por ebligi al ĉiuj kategorioj de esperantistoj el ĉiuj landoj partopreni la kongreson, ni bezonas loĝejojn en ĉiuj prezkategorioj. Ni do urĝe bezonas kapablan homon el Antverpeno aŭ ĉirkaŭaĵo por fari tiun esplorlaboron (hoteloj-kampadejoj-internulejoj-komunaj loĝejoj ktp.)
2. La turismaj aranĝoj estos unu el la gravaj programeroj de nia kongreso. La distancoj en Belgio ne estas grandaj kaj sur tiu malgranda areo estas tiom da vidindaĵoj, ke ni eble povos fari pli ol oni kutime faras. Komisiono devus pristudi ĉiuj eblojn, pripensi la problemon de la interpretistoj (en kaj ekster la aŭtobusoj) ktp. La turismaj ekskursoj konsistigas seriozan parton de la kongreso: forporti la Internacian Lingvon ekster la kongresejon!
Kiu havas ideojn? Kiu akceptas aktive kunlabori? Jam anoncis sin: Verswijfel el Keerbergen, de Smedt el Dendermonde kaj Mertens el Bruselo. Kiu sekvos? Loĝado en Antverpeno tute ne estas necesa.
3. Por la kulturaj aranĝoj ni petis la kunlaboron de iu ege kompetenta Jo Haazen. Li akceptis respondeci pri tiuj aranĝoj, sed li nepre bezonas plurajn kunlaborantojn, precipe por la praktika laboro. Kiu sin prezentas? Ne estas necese ke vi loĝu en Antverpeno.

4. Jo Haazen akceptis komponi muzikon por speciala kongreskanto. Kiu kapablas fari valoran tekston?
5. Ni nepre bezonas esperantlingvajn bildkartojn. S-ro Paesmans jam akiris la permeson por Antverpenaj bildkartoj. Kiu faros simile por aliaj urboj?
6. Frans Luyten el Antverpeno konsentas respondeci pri ĉiuj filatelistaj aranĝoj . (Ekspozicio pri Esperanto-poŝtmarkoj, Esperanto-glumarkoj ktp.) sed ankaŭ li bezonas kunlaborantojn el la tuta lando! Ni scias duonoficiale, ke la kongreso disponos pri speciala Esperanto-poŝtmarko.
7. Dum la kongreso aperas ĉiutage unu aŭ pluraj specialaj kurieroj, tiuj estas novaĵleteroj rilate al la lastaj kongresnovaĵoj, eventualaj programmodifoj, lastmomentaj informoj, ktp. Ni serĉas ankaŭ kunlaborantojn por ĉi tiu grava servo.
8. Pri la granda libroservo zorgos Sonorilo. Bonvena tamen estas ankoraŭ multaj helpantoj, prefere kun scio de la Esperanto-literaturo.
9. La gazetara servo estas unu el la plej gravaj servoj (konstantaj rilatoj kun la ĵurnalistoj de la gazetaro, radio kaj televido; redaktado de tekstoj, ktp.). Kiu sentas sin kapabla respondeci pri tiu servo aŭ kunlabori?
10. En la akceptejo (giĉetejo) de la kongresejo deĵoras multaj personoj por disdoni dokumentojn, informi la kongresanojn, akcepti kaj ekzameni plendojn, solvi prob-emojn, organizi la ĉiutagajn enurbajn ekskursojn ktp. ktp. Ni klopodos eviti tro longajn enviciĝadojn, kaj pro tio antaŭvidas la dvidiĝon de pluraj giĉetoj. Kiuj bonvolemuloj sin prezentas por tiu ĉi ege grava deĵorado? Ne necesas loĝi en Antverpeno!
11. Ni nepre bezonas franclingvajn kunlaborantojn, i.a. por kontaktiĝi en Bruselo kun la franclingva ministerio pri kulturo kaj edukado, kun la franclingva ministerio pri kulturo kaj edukado, kun la franclingva Ĝenerala Komisariato pri Turismo, ktp. Ĉu iu prezentos sin baldaŭ?

KONKLUDO:

- Kiel vi vidas, ni bezonas multajn aktivajn kaj fidindajn kunlaborantojn! UK ne estas afero de nur kelkaj homoj, sed de la tuta enlanda esperantistaro.
- Inter la novaj gekursanoj, certe troviĝas eblaj kunlaborontoj. La kursgvidantoj ne forgesu paroli regule pri tiu unika esperantista okazontaĵo.
- Ĉiuj bonvolemuloj, ĉiuj kandidatoj al iu ajn posteno sin anoncu kiel eble plej baldaŭ ĉe unu el la subskribantoj. Ankaŭ ideoj, sugestoj, proponoj estas ege bonvenaj. Koran antaŭdankon!

Roger de Schepper
Sekretario de LKK
Doornstraat 22

2610 WILRIJK

tlf. (031) 27 24 05

Edward Symoens
Vic-prezidanto de LKK
Putsesteenweg 131/A

2180 KALMTHOUT

tlf. (031) 66 62 66



# B E L G A  E S P E R A N T O - F E D E R A C I O

## D U A  F E D E R A C I A  K O N G R E S O

Datoj : 3-a kaj 4-a de oktobro 1981

Loko : 1060 BRUSELO, Fortstrato 35 A

Provizora programo

- Sabato 3-a de oktobro : 10.00 h. interkonatiĝo
  samtempe : BEF-estrarkunsido
  Lingva ekzameno, rapidkurso
  12.00 h. tagmanĝo (300 F.) kaj/aŭ trinkaĵoj surloke
  13.00 h. omaĝa ceremonio en av. Zamenhof en Anderlecht
  16.00 h. sandviĉoj kaj trinkaĵoj en la kongresejo
  17.00 h. ĝenerala kunsido de APE
  administrantara kunsido de FEL
  kunsido de BEFA
  Kunsido de ILEI
  samtempe : prezentado de filmoj/videokasedoj
  19.00 h. muzik- kaj filmvespero - dancebleco
- D-manĉo 4-a de oktobro : 09.30 h. ĝenerala jarkunsido de BEF
  12.00 h. manĝebleco en la ĉirkaŭaĵo
  13.30 h. ekskurso : gvidata vizito de la historia centro de Bruselo aŭ de muzeo

---

## A L I Ĝ I L O

resendota antaŭ 15 09 1981 al Marc DEMONTY, Av. des Missionnaires 39 b.5
Missionarissenlaan
1080 BRUSELO

Nomo ______________________________

Profesio (nur por statistikaj celoj, do ne devige) ______________

Adreso ______________________________

Intencas partopreni : la tagmanĝon je la 3-a de oktobro jes/ne °
la vespermanĝon je 4-a de oktobro jes/ne °
la ekskurson al Anderlecht - sabate jes/ne °
la lingvan ekzamenon jes/ne °
la ekskurson de dimanĉo jes/ne °

Deziras tranokti : ĉe esperantistoj jes/ne °
en hotelo jes/ne °

° indiku la deziraton.

Dato kaj subskribo.

Maandblad Jaargang 1 N° 5
Monata bulteno Jarkolekto

# ESPERANTO EN BELGIO

Verantwoordelijke
Respondecas Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

---

L.S.,

La nuna numero de ESPERANTO EN BELGIO estas adiaŭo mia kaj bonvensaluto al S-ro André MERTENS-GOOSSENS kiel ĝenerala sekretario de BEF.

Efektive, finfine amiko Andre akceptis la taskon de ĝenerala sekretario kaj tiel do malfermas la vojon al pli bona kaj pli kohera agado de ambaŭ regionaj asocioj APE kaj FEL.

Ja mi opnias, ke se ambaŭ asocioj aŭtonome bone laboras, BEF pli bone kaj pli serioze povas plenumi sian taskon de kupola organizaĵo.

Al Andre mi deziras multe da sukceso kaj fruktodonan laboron en sia nova tasko.

Al vi ĉiuj mi elkore dankas pro la fido kaj ŝatata kunlaboro kiujn mi povis sperti dum mia ofic-periodo.

Tamen ne timu, ke tio ĉi estas definitiva adiaŭo. Tute ne ! Ni certe ankoraŭ renkontiĝos okaze de ĉiuspecaj aranĝoj en la Esperanto-kampo.

Kun plej amikaj sentoj, sincere salut-man-svingas

JB.

-----------

## AUBEL - 3-LANDA RENKONTIĜO

Sabaton 19-an de septembro, en suna vetero, okazis en Aubel, Prov. Lieĝo, Tri-Landa Renkontiĝo, dum kiu inaŭguriĝis ESPERANTO-LABOREJO.

La inaŭguran solenaĵon enkondukis D-ro P. Denoel, skizante la procedon de la unua ideo ĝis la realigo de la entrepreno.

Post li paroladis, nome de " Kulturaj Aferoj de la Provinco Lieĝo ", S-ro Remouxchamps. Li kaŭzis al si entuziasman aplaŭdon, farante sian paroladon en Esperanto. Li cetere estis dekoraciita per la "Esperanto-ordeno : la Verda Stelo.

S-ro G. Maertens, prezidanto de UEA, mallonge sed klare remarkigis, ke Esperanto ne plu estas artefarita, sed vere natura, vivanta lingvo, rekonita pli kaj pli sur oficiala nivelo. Li memorigis i.a. la "Raporton Patterson".

Li ankaŭ altiris la atenton sur la instruadon kaj informadon de Esperanto, emfazante ke ĝi estas tre taŭga rimedo por kulturaj interŝanĝoj, ne metante en danĝeron aliajn lingvojn.

"Esperanto", kiel diris S-ro Chaves en la Brazilia Kongreso, "venas al ni sen armiloj. Ĝi estas universala ŝlosilo al pacaj interkontaktoj sur internacia tereno".

S-ro M. Demonty, prezidanto de BEF, emfazis la neceson pri taŭga informado, pere de korektaj rimedoj.

Plie esprimis dezirojn kaj gratulojn, S-ro P. Firmenich nome de la Germanaj partoprenantoj, S-ro H. Peters nome de Nederlandaj Limburganoj kaj J. Bovendeerd nome de Belgaj Limburganoj kaj nome de FEL.

La honorvino metis la ĉeestantaron en la bonan humoron por ke la tagmanĝo okazu en festa etoso en Abatejo Val Dieu.

Sekvis Di-servo en la abateja preĝejo, vizito de la "laborejo" kaj tre sukcesa distra vespero en kiu ĉefrolis aro da dancistinoj el Eupen per tre belaj duon-klasikaj dancoj, Ges-roj Cloose per arte kunmetita serio da lum-bildoj kaj S-ro Clement Tholet per sprita kaj klaŭne prezentita prelego pri la malbona efiko de alkoholaĵoj.

Ni multe ĝojis la feston.

Bijlage bij ESPERANTO EN BELGIO

# 67-a Universala Kongreso de Esperanto 1982

**Arsenaalstraat 5, B-2000 Antwerpen**

Kara Samideano,

En la septembra numero de "Esperanto en Belgio" ni alvokis la belgajn esperantistojn al aktiva kunlaborado por la Universala Kongreso en Antverpeno.
Kelkaj gesamideanoj tuj reagis, sed ne sufiĉe multnombraj! Ĉu ni ree povas insisti por ke ĉiuj, kiuj intencas iamaniere fari "ion" por helpi nin, sin anoncu ek de nun. Ne atendu la lastan minuton! Se ni deziras perfekte organizi "nian kongreson", t.e. tiun de ĉiuj belgaj esperantistoj, kaj montri al la internacia esperantistaro kion ni kapablas fari, anoncu vin multnombre por helpi en la akceptejo, dum la ekskursoj, por skribi artikolojn, por traduki tekstojn, ktp.

La "Dua Bulteno" aperos multe pli frue ol kutime, jam en la komenco de januaro, sed tio signifas ke je la fino de novembro ni transdonu al la Centra Oficejo konkretajn informojn pri
- loĝado (kategorioj kaj prezoj)
- ekskursoj (priskribo kaj prezo)
- ĝeneralaj vivkondiĉoj en Belgio : vetero, trinkmono, taksioj, ktp.
- la infana kongreseto.

Ni urĝe bezonas plurajn kunlaborantojn!

Pri la infana kongreseto respondecis S-ino Frederickx kaj edzo. Pro la tragika sortobato, kiu trafis tiun familion, ŝi ne plu povas plenumi tiun taskon. Ni do urĝege bezonas respondecul(in)on pri tiu kongreseto! Aŭ ĉu la belgaj esperantistoj estas tiel oldaj ke neniu kapablas gvidi tiun kongreseton?

Ne forgesu aliĝi al la kongreso!!

Belgio ja havas longan kaj ege valoran Esperanto-tradicion sed ni ankaŭ pruvu tion en Antverpeno.
Al la 45-a en Bruselo aliĝis 259 belgoj
64-a en Lucerno 154 svisoj
65-a en Stokholmo 428 svedoj
67-a en Antverpeno aliĝis ĝis nun nur 30 belgoj!

Vi sendu la aliĝilon rekte al Roger De Schepper kaj pagu en la poŝtĉekkonto 000-0457808-65 de 67-e Wereldcongres van Esperanto 2000 Antwerpen.
Permesu ke ni memorigu kelkajn kotizojn :

| | |
|---|---|
| - kongresano ne membro de UEA | 2750 BF |
| - edz(in)o de tiu kongresano | 1950 BF |
| - kongresano individua membro (MA) | 1850 BF |
| - edz(in)o de tiu kongresano | 1670 BF |

Pro la kolektiva abono al Esperanto, sufiĉas al la membroj de APE kaj FEL ricevi la jarlibron de UEA por aparteni al tiu lasta kategorio. Por la aliaj kategorioj vidu la aliĝilon.
Ne forgesu ke tiuj kotizoj validas nur por pagoj ricevitaj antaŭ la fino de la jaro!

Pliajn informojn vi povas ricevi de
Roger De Schepper, Doornstraat 22, 2610 Wilrijk, tf (031)272405
Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A, 2180 Kalmthout, (031)666266

## BEF - 2-A FEDERACIA KONGRESO

(ĝeneralaj impresoj pri ... )

Diversaj organizaĵoj partoprenis, i.a. APE, BEFA, FEL, FLEJA, samkiel la Flandra Sekcio de Eŭropa Klubo.

Grave estas, ke la partopreno estis senpaga, kvankam kaj tio estas vere bedaŭrinda, partoprenis nur kelkaj.

La organizado glate funkciis, krom kelkaj eroj kiel la tagmanĝo, la distra vespero kaj la loĝado.

Nenio pri la manĝo mem ! ĝi estis ege bongusta, sed ... ĝi daŭr-eg-is preskaŭ tri plenajn horojn ! En tio ĉi, ni ne komprenas la organizintojn. Ja ne estis la unua fojo ke ili aranĝis la tagmanĝon tie kaj jam havis okazon sperti la nekredeble malrapidan priservadon. Tamen ili elektis la saman restoracion, kvazaŭ ĝi estus la sola en la regiono.

Sabat-vespere, anstataŭ la promesitan distran vesperon, ni ricevis la inviton forlasi la salonon antaŭ la 8-a horo !

La anoncita loĝad-servo tute ne funkciis. Viktimo estis inter alie S-ro Maertens, kiu kiel prezidanto de UEA estis preta fari festparoladon dimanĉon matene. Li ne trovis loĝ-eblecon kaj estis do devigata hejmenvojaĝi. Kia honto ! Ĉu do mirinde, ke la antaŭvidita festparolado ne okazis ?

Pri la dimanĉa programo ni povas mencii nur la antaŭtagmezan ĝeneralan kunsidon. Rilate al la posttagmeza programo ni ricevis neniun informon.

Krom tio ĉio iris "glite kaj glate" ...

JB

---

Reagoj el la junulara angulo.

## UNUFLANKA KUNSIDPLENA BEF-KONGRESO

La BEF-Kongreso de 3/4-a de oktobro en bela kulturdomo en Bruselo ne sukcesis allogi dum sabate pli ol tridekon da homoj, kvankam ĝi estis la nura landa renkontiĝo jare.

Malgraŭ la nomo "KONGRESO", la aranĝo fakte ne havis rajton je tiu nomo. Krom aro da kunsidoj, ĉeestindaj kaj necesaj por la aktivuloj, mankis la kompleta oficiala, kultura kaj distra partoj promesitaj en provizora programo. Eble tamen kelkaj eroj eĉ okazis, sed neniu informo pri tio. La forpelo el la ejo vespere forprenis la lastajn ŝancojn je ekesto de kongresa etoso, kontaktoj inter la partoprenantaro kaj ekster-

kunsidaj movadaj diskutoj "inter poto kaj pindo".

Ĉu la nur formala ekzisto de BEF povas esti preteksto por tiamaniere kongresi ? Tiuspeca aranĝo pli seniluziiĝis junulojn ol altiri ilin al Esperanto-mondo en kiun ili devus alveni post siaj junaj jaroj.

Feliĉe okazos en Belgio en la tuja estonteco ankoraŭ kelkaj esperebla pli konvinkigaj " kongresoj ".

Kiki Tytgat.

---------------

S O N O R I L O INFORMAS ....

Okaze de la jarfinaj festoj, Eldonejo/Libroservo SONORILO estos je via dispono je la 22-a kaj 23-a de decembro de 10.00 ĝis 12.15 h. kaj de 14.15 ĝis 18.00 h.

Mendoj de pli ol BF 1.000,- estos rekompensitaj per donaco.

Listo pri periodaĵoj peratoj de SONORILO estas havebla kontraŭ unu poŝtmarko de BF 9,-.

Kiu abonos EL POPOLA ĈINIO antaŭ fino de februaro 1982 ricevos belegan artan kalendaron.
Abonprezoj : 1-jara abono : BF 180, 2-jara : BF 300, 3-jara : BF 450.

-----------

P L E N D O N.

.. ni ricevis, ke "ESPERANTO ne entenis Esperanto en Belgio".

Nu jes, ĉar ĝi ne estis preta ! Okazis ja tiom samtempe, ĉu ne : BEF-kongreso, diversaj estrar-,administrantar-, kaj aliaj kunsidoj, pri kiuj devas protokoli nur unu sola persono. Ĉu vi konas lin ?

Ĉu estas tro petite havi iom-et-e da pacienco ?

Dankon.

A T E N T O N , NI PETAS !

La speciala studotago, pri kiu jam temis kelkajn fojojn, gvidota de S-ro G. Maertens N E povos okazi la 27-an de februaro 1982, ĉar ĝi koincidus kun la festado de la Semajno de Internacia Amikeco en Kalmthout.
Ĝi okazos anstataŭe SABATON 6-an DE MARTO 1982.

Bonvolu kompletigi vian kalendaron.

-----------

Maandblad Jaargang 1 N° 6 NOV. 1981
Monata bulteno Jarkolekto

# ESPERANTO EN BELGIO

Verantwoordelijke Respondecas Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

# P R O T O K O L O

PRI LA ESTRAR-KUNSIDO DE SABATO 03 10 1981 EN BRUSELO, OKAZE DE LA 2-A FEDERACIA KONGRESO 1981.

Ĉeestas : estraranoj : Marc DEMONTY, F-ino L. DREZE, Edward SYMOENS, Jules VERSTRAETEN, Clément THOLET, Jan BOVENDEERD
ebservantoj/administrantoj : Gregoire MAERTENS, Andrée ORSOLINI Wim DE SMET.

Prezidas : Marc DEMONTY
Protokolas : Jan BOVENDEERD.

Komenciĝo : 10.00 h.

## T A G O R D O

1. Statuto.

1.1.1. Alvenis letero de UEA-komisiono pri statutoj, laŭ kiu la statuto de BEF, art. 4 ne kongruas kun la statuto de UEA.
Jen parto de la teksto :
" Kun bedaŭro ni devas informi vin, ke la komisiono (pri statutoj) konstatis ke laŭ par 4 de via statuto la "membronombro de BEF devas esti minimume 10 kaj maksimume 100."
Tio signifas ke BEF ne rajtas havi komitatanon A ĉe UEA, nur observanton..".

1.1.2.Tri proponoj :

1.1.2.1. ĉu adapti la statuton al tiu de UEA

1.1.2.2. ĉu lasi la statuton senŝanĝa vid' al vide la Belga Ŝtato, sed forigi BEF vid' al vide UEA, kaj peti de tiu ĉi rektan rekonon kiel landaj asocioj de ambaŭ APE kaj FEL.

1.1.2.3. ĉu lasi ĉion senŝanĝa kaj defendi ĉe UEA la starpunkton ke la komisiono eraras kaj ke nia statuto jes kongruas kun tiu de UEA.

1.1.3. Post longa diskuto akceptiĝas 1.1.2.3. kaj la sekretario estas petata peti al UEA antaŭvidi kunsidon okaze de la venonta UK en Antverpeno por permesi al ni ekspliki nian vidpunkton.

1.2.1. Sed tiu ĉi decido denove (por la tria fojo) kaj pli akre ankoraŭ frontas nin al la problemo de la sekretariato.

1.2.2. JB, kiu ĝis nun - post du rifuzoj de la ĝenerala kunsido rilate al lia eksiĝpropono- provizore daŭrigis la taskon por ne endanĝerigi la movadon, konstatas , ke malgraŭ la rifuzoj de la ĝenerala asembleo, laŭ la jarlibro de UEA, li ne plu estas ĝenerala sekretario de BEF; li troviĝas eĉ dualoke, post Clement THOLET.
Kiu decidis tion, estas granda demando-signo, sed li akceptas, eĉ ambaŭmane !



1.2.3. Ĉiu konsentas, ke por bone labori, ne eblas prizorgi kàj BEF kàj FEL-sekretariaton samtempe.

1.2.4. Sed kie trovi anstataŭanto ? Ĉu eble en Bruselo ? Prefere, ĉar ja la prezidanto loĝas en la Brusela aglomeracio. Pleje taŭgus do persono el la Brusela regiono por tiel certigi pli facilan kontakton inter prezidanto kaj sekretario.

1.2.5. Oni pensas pri S-ro André MERTENS-GOOSSENS.

1.2.6. La prezidanto kontaktiĝos lin kaj klopodos konvinki lin.

ndr.
Intertempe S-ro Mertens-Goossens jam akceptis, tiel ke la nova sekretario de BEF ekde nun estas :

André MERTENS-GOOSSENS
Achter d' Abdij 46
1720 DILBEEK Tel. 02/465 09 46

2. FINANCA SITUACIO

2.1. Post detalaj klarigoj fare de J. Verstraeten, la estraro akceptas la buĝeton submetotan al la ĝenerala kunsido.

2.2. Tamen, el la diskuto ankaŭ elmontriĝas, ke el ĝenerala vidpunkto, al la estrarnoj mankas sufiĉa kono pri administrado kaj financado.

2.3. Necese estus do organizi studotagon pri Administrado kaj Financado. S-ro G. Maertens pretas gvidi tiun studotagon.

2.4. Pro la fakto ke FEL jam organizis serion da kadrokursoj kaj disponas pri la necesaj ejo kaj akomodaĵoj, ĝi aldonos tiun studotagon al sia serio kaj invitas ĉiujn interesitojn al ĝi.

ndr.
La studotago okazos sabaton 6an de marto 1982 en
ESPERANTO-DOMO
Frankrijklei 140, ANTVERPENO.
(eblos tagmanĝi surloke).

La en la kunsido proponita dato (27 02 1982) ne taŭgas, ĉar ĝi koincidus kun la Kalmthouta festado de la Semajno de Internacia Amikeco.

3. DIVERSAĴOJ

3.1.1. S-ro W. De Smet demandas kiu estas la rezultato de la kampanjo de antaŭ kelkaj jaroj, fare de S-ro Vancenacker, rilate al kreado de agentejo ĉe ASSUBEL-Ŝparkaso kaj intence al malfermo de personaj ŝparkontoj.

3.1.2. La rezultato ne estas konata, sed la provo ŝajnas esti ne tro sukcesa.

3.2.1. Rilatoj BEF/UK/IJK
S-ro W. De Smet ankaŭ petas alvoki ĉiujn grupojn organizi antaŭ la fino de la jaro almenaŭ unu vesperon pri la UK/IJK kaj fari al la LKK-oj sugestojn ktp pri la organizado kaj por trovi kunlaborantoj.

3.2.2. La prezidanto alvokos la ĝeneralan kunsidon tiel agi.

3.3.1. Okaze de la UK, EEC (Eŭropa Esperanto-Centro) organizos lingvistikan konferencon en Bruselo.

3.3.2. EEC ankaŭ invitos la Eŭropajn Parlamentanojn partopreni la UK-n.

Fino de la kunsido : 12.20 h.

---------------------



# PROTOKOLO

PRI LA ĜENERALA KUNSIDO DE DIMANĈO 4-A DE OKTOBRO 1981 EN BRUSELO.

Prezidas : Marc DEMONTY
Protokolas : Jan BOVENDEERD

Malfermo : 10.00 h.

La prezidanto bonveniginte ĉiujn, anoncas ke alvenis salutoj kaj bondeziroj de D-rino Flara SZABO-FELSÖ, nome de UEA kaj de D-ro Pol DENOEL, honora prezidanto de BEF, kiu samokaze petas senkulpigon pri sia neeblo ĉeesti.

Ankaŭ petis senkulpigon S-ro Edward SYMOENS.

La prezidanto ankaŭ aludas al la 3-Landa Renkontiĝo kiu okazis en AUBEL je 19 09 1981.
Plie li alvokas ĉiujn Esperanto-grupojn okazigi antaŭ la fino de la jaro almenaŭ unu klubkunvenon rilate al la Universala Kongreso kaj Internacia Junulara Kongreso de venonta jaro, cele al kunigi sugestojn kaj - ĉefe - kunlaborantoj por la oraganizado.

RAPORTADO

1. Financoj :
Post detalaj klarigoj de S-ro J. VERSTRAETEN rilate al la en- kaj elspezkontoj kaj respondo al la faritaj demandoj, la buĝeto estas aprobita.

2. SONORILO
S-ro Roger DE SCHEPPER, nome de S-ino DE SCHEPPER-VEREECKEN, voĉlegas la bilancon 1980 kaj aldonas, ke SONORILO aĉetis skribmaŝinon kiu tamen ne aperas en la bilanco. Ili aĉetis tion sub la titolo "ĝeneralaj elspezoj" por eviti impostojn.
F-ino ORSOLINI volas scii ĉu SONORILO apartenas al BEF.
Respondo : Ne, SONORILO estas memstara ASPC.

ndr. Tiel la spezo-kontoj kaj buĝeto de BEF, kiel la bilanco de SONORILO estas enrigardeblaj en la sidejo de BEF. Petu la sekretarion.

3. APE (raportas F-ino DREZE)

Eldono :
Ni daŭrigas la eldonon de nia bulteno ESPERANTO EN MARCHE, presita de Grafita Centro ...

Bulteno INTER-CLUBS aperas laŭbezone; ĝi estas ligilo inter la grupoj.

Kulturo kaj Edukado:

Kreado de perkoresponda unuagrada kurso, kies respondeculo estas D-ro Denoël. Li ricevis dekon da informpetoj kaj tri personoj ebskribiĝis.
Ni finance helpis la Somerajn Universitatajn Kursojn.
Ni klopodis starigi Komisionon pri Kulturo kaj Edukado; tri geanoj konsentis partopreni ĝin. Ni esperas ke ĝi baldaŭ funkcios.

Turismo

En "Inter-Clubs", ni alvokis la grupojn por ke ili klopodu ĉe la turismaj oficoj pri presigo de Esperanto-propagandiloj. Du grupoj agis tiucele : Liège kaj Verviers.
En Liège la koncernata skabeno rifuzis pro necesa ŝparemo. La grupo decidis fari mem la laboron, tradukis la tekstojn sur apartaj folioj enŝovendaj en la franclingvajn propagandilojn, kiuj estis tiel sendataj al la 66-a UK.
La grupo de Verviers ricevis favoran respondon de la urbo Verviers kaj de la urbeto Polleur, kun promeso plenumi tion venontan jaron.

Dum nia ĝenarala Asembleo, estis aprobita la raporto de la pasintjara kunsido, prezentitaj la ĉi-jaraj morala kaj financa raportoj, priparolita la aktiveco de la grupoj.
Ni interŝanĝis niajn ideojn pri la propagando por la kursoj kaj la agado por turismo.
La komitato restas la sama : neniu kandidato sin prezentis.

MORALA RAPORTO DE ASOCIO POR ESPERANTO (Cl. Tholet.)

Necesas denove memorigi, ke laŭ niaj organizaj statutaj kutimoj, la membraron konsistigas la grupoj de APE kaj de FLE. Aliskribe, la geanoj de BEF-estraro kalkuliĝas po unu laŭ ĉiu kvindeko da ili. Ĉiu plia komencanta kvindeko rajtigas unu plian reprezentanton.

Jen la listo de niaj BEF-delegitoj nome de APE.

| | |
|---|---|
| Por Bruselo : | Emile LADURON |
| | Roger BRABANT |
| Charleroi : | Rober DUMORTIER |
| | Roger DESTABELLE |
| Eupen : | Louise VERTONGEN |
| Liège : | Denise DUPONT |
| | Emile GILLET |
| Welkenraedt : | Henri LENTZEN |
| Namur : | ne respondis |
| Verviers : | ne precizigis |

Tiuj ĉi grupaj delegitoj konfirmis la kern-estraranojn (administrantojn de BEF), kies nomoj estas :

F-ino L. DREZE, prezidantino
S-ro THOLET, sekretario
S-ro BINOT, financa administranto
F-ino ORSOLINI, Inform-faka administrantino
S-ro NORGA, administranto.

Pri la ĝenerala agado, vidu la raporton de F-ino DREZE.

4. BEFA (raportas S-ro Steenhoudt)

S-ro L. DE SUTTER petis senkulpigon pro partopreno en faka kunsido rilate al la kunmetado de fak-terminaro.
BEFA daŭre organizas kursojn por fervojistoj kaj kunlaboras, kiel elmontriĝas el la supra alineo, en la kunmetado de fervoja fakvortaro.
BEFA partoprenis en diversaj kunvenoj eksterlandaj (Franca, Germana, Nederlanda).
BEFA modeste sed konstante laboras.

5. FEL (raportas J. Bovendeerd)

Pro la fakto, ke la laborjaro de BEF laŭstatute diferencas de tiu de FEL, ne estas facile fari jarraporton en la nuna momento. Tamen estas eble doni ĝeneralan superrigardon pli malpli situanta super la BEF-jaro.

Jam komence de pasinta jaro, FEL-estraro decidis dividi la estrarajn taskojn inter la diversaj komitatanoj. Tio havas jenajn avantaĝojn :

1. Kie antaŭe la kasisto respondecis pri la tuta financa programo, li nun estas "estrarano pri financoj" kaj lia tasko estas ĉefe kontrola, dum 2-a persono faras la librotenadon kaj 3-a okupiĝas pri la financplanado kaj pri la kontrolo de la buĝeto.
2. Kie antaŭe la respondeco pri la administrado kaj tiu pri la realigo de la decidoj kuŝis sur la ŝultroj de unu sola persono, la sekretario nun ĉiu komitatano prizorgas mem la administradon specifan al sia tasko.
3. Raportado : pro la fakto, ke ĉiu komitatano devas ĉiumonate raporti pri sia aktiveco, li ne povas al si permesi nenion fari, ĉar finfine li devus honti pro tio, ke li havas nenion por raporti. Ankaŭ, eĉ se li fantazius pri ia agado, li ne povus longe persisti, ĉar finfine la vero tamen aperos.
Kompreneble, tio alportas ankaŭ malavantaĝon en tiu senco, ke kiam komitatano havas nenion por raporti pro ...., ni riskas ne vidi lin

en la komitat-kunsido. Tio tamen certe ne estas komparebla kun la avantaĝoj. Male, tio havas plian avantaĝon, nome ekkoni la kvalitojn kaj valoron de la koncerna komitatano.

Por pli da klareco, jen kiel estas dividitaj la diferencaj taskoj :

- financoj : ĝenerale - Jules VERSTRAETEN
  planado/buĝeto : Roger DE SCHEPPER
  librotenado : Paul PEERAERTS
- informado, planado, agado : Edward SYMOENS
- kulturo : Fernand ROOSE
- administrado : Jan BOVENDEERD
- edukado (organizado de-) : J.B.

Plie nomiĝis respondeculo por ĉiu provinco por prizorgi la kontaktojn kun la grupoj kaj por defendi se necese ties interesojn vid'al vide la estraro. Plie partoprenas en la estraro reprezentanto de la junulara asocio FLEJA.

Tiu labormaniero jam ebligis al ni i.a.

- realigi financplandaon detale ellaboritan kaj de proksimume sekvatan
- havi detalan superrigadon de la librotenado kaj de niaj rimedoj
- trovi la malfortajn punktojn kaj priekzameni la necesajn eblecojn por alfronti ilin.

Rilate al la Informado, Planado, Agado, la tiurilata komitatano, kiu, feliĉe por ni, ankaŭ okupiĝas pri tiu sama tasko kadre de UEA-komisiono, jam ellaboris detalan agadprogramon realigota internaciskale kaj pritraktata sur diversaj niveloj.

El kultura vidpunkto, ĝis nun realiĝis ĝenerala katalogo pri Esperanto verkoj en la Flandraj bibliotekoj. Tamen la eldonkostoj estas nekompareble altaj proporcie al la vend-eblecoj. Cetere la iama kuraĝigo de la Ministerio finfine elmontriĝis vana aŭ preskaŭ.
Nunmomente ni eldonas verkon de unu el nia membroj, Rik de Roover, kiu cetere gajnis premion en la Belartaj Konkursoj de UEA - Infanliteraturo.

Sur la tereno de la administrado ekzistas bonegaj rilatoj kaj kunlaboro kun Esperanto-Centro en Antverpeno.

En la kampo de la edukado, ni organizis serion da kadrokursoj por ( almenaŭ ni tion esperas) formi taŭgajn kadromembrojn. Plie, konsiderante ke en la instruado ne estu instruata nur la gramatikon de la lingvo, sed ankaŭ ĝian uzon, ni preparis broŝuron por kursgvidantoj "ESPERANTO, KION MI POVAS FARI PER TIO ?", ia iom detala superrigardo pri la eblecoj de Esperanto.

Planoj en tiu rilato estas ankaŭ organizi, krom la kadrokursoj mem, ĝeneralajn seminariojn, dum kiuj ni esperas povi interŝanĝi ideojn, spertojn sugestojn kaj eventuale indiki aŭ trovi novajn vojojn. Koncerne tion, ni povas anonci tre ĝojigan fakton, nome ke ni venis al reciproka kunlaboro kun la junulara asocio FLEJA en tiu senco, ke ekde nun ni ne plu agados duoble aŭ pretere/apude.
Pli ni povas malkaŝi al vi, ke kune kun FLEJA ni startis varbkampanjon, unue kadre de la preparado al la venontjara UK/IJK, due prepare al la jaro 1937, la 100-jara datreveno de la eldono de la unua broŝuro pri Esperanto. Tiurilate ni alvokas niajn grupojn al starigo de kursoj, al informado pere de lokaj gazetoj, al retrovo (ebla) de iamaj membroj ktp.
Kadre de nia eduk-programo, ni ankaŭ organizas oficialan korespondan kurson.

Provizora lasta paŝo de la reorganizo estas la centralizado de la administrado rilate al la financa kaj membra/kotiza ordigado. La estraro prezentis tute novan kotizo-sistemon, en kiuj la kotizoj estas malligitaj de la abonoj kaj laŭ kiu estos eble por la membroj memorteni plu nur unu sola adreso por ĉio, kio koncernas Esperanton. Plisimpligo kaj plifaciligo do por ĉiuj.

Ni esperas, ke ĉiuj tiuj niaj penoj kaj la formado de kadromembroj finfine kondukas al bona organizita movado kaj ke finfine nia strebado alportos al ni la jam tiel longtempe sopiratan sukceson.

6. <u>ILEI</u> (raportas Emile Van Damme)

   a. ILEI Belgio, kiu ne plu abonis la internacian revuon, denove kontaktis la internacian ILEI-organizon, cele al nova abono de IPR (Internacia Pedagogio Revuo).
   b. La kotizo plialitiĝis de BF 50 al BF 300, kio implicas la abonon al IPR.
   c. <u>Agado</u> : okazas regule kunvenoj ĉiun duan monaton.
   d. ILEI preparas broŝuron por gepatraj asocioj. S-ro E. Symoens verkis 40-paĝan broŝuron "KULTURA KAJ PEDAGOGIA VALORO DE ESPERANTO".
   e. ILEI partoprenos la de UEA lanĉotan kampanjon, kiu okazos en diversaj landoj samtempe.
   f. ILEI eldonos "INFORMILO"n por instruistoj.

7. <u>BEF</u>

   A. Raporto de la ĉefdelegito (Andrée Orsolini)

      a. <u>UEA</u>.
      Membraro : en 1980 : 202 ind. Membroj; en 1981 :194 + 4 rekte aliĝintaj al UEA.
      La donaca sistemo donis bonajn rezultojn al FEL (60 al FEL, dum

nur 23 al BEF)

Ni devus daŭrigi la kontrakton kun UEA por la livero de la revuo ESPERANTO je reduktita prezo.

Tamen denove krekas la kotizoj por 1982 : MA = 950 F.
MJ = 380 F.

UEA komplikigas la aferojn per 2 specoj de markfolioj.
La kasistoj bonvole notu : 1 por Individua Membro kaj 1 por "aligita" membro.

--------

Perado por kongresoj :
En aprilo mi anoncis al D-ro SADLER mian intencon ne plu daŭrigi la peradon por kongresoj. Por 1982 ne estas problemo, ĉar LKK ja zorgas por la kotizoj ktp. Tamen, ĉar la listo de perantoj devas esti je dispono en la antaŭa kongreso, nova peranto devas esti indikita en 1982. En AUBEL mi klarigis mian sintenon al UEA-prezidanto G. MAERTENS. Ĉar EEC (Eŭropa Esperanto-Centro) havas taŭgan kunlaborantinon, Anne Tilmont, tiu varbado de kotizoj povus esti farita de ŝi kaj alporti maklerajon al EEC. Oni ankaŭ povus pripensi grupiĝon de la kotizoj de la Eŭropa Komunumaro. Pri la laboro farata en marto, aprilo, majo rilate al la mendoj de loĝadeblecoj ktp, tiu oficejo povus zorgi por la Eŭropa Komunumaro kaj enspezi la maklerajojn. Fakte EEC laboras por tiuj, kiuj subtenadas ĝin.

B. ESPERANTO EN MARCHE (A. Orsolini)

Se la ĵurnalo de preskaŭ du jaroj estas bonaspekta, tio kostas multe. Tiel multe eĉ, ke Grafika Centro ne volas doni al ni kopion de la fakturoj !

Fakte BEF pagas la eldonadon kaj ricevas la ministeriajn subvenciojn rilataj al nia eldonlaboro (senpaga).

Regule neregule (al) tiu bulteno mankas kunlaborantoj. Ĉu ni ofertu ion al la personoj kiuj sendos valorajn artikolojn ? Sed kion ? Feliĉe ke mi povas uzi artikolojn de mia amiko Piron.

S-ino Fichefet, kiu prizorgas la adresaron, provis forstreki multajn adresojn, sed tute ne estis helpita de klubo kiel Bruselo ekz. La membrolistoj alvenas multe tro malfrue : ni sendas la unuan numeron al la novaj membroj ankoraŭ en junio !

Por rentumadi tiujn listojn, ĉu oni vidus eblecojn por vendi servojn?

Por la unua fojo, la prokrasto estas grava, ĉar la N° sept/okt. kiu anoncas, almenaŭ rememorigas pri AUBEL kaj pri la Federacia Kongreso, ankoraŭ ne alvenis. Ekz. la presprovaĵoj alvenis la 11-an sub koverto datita la 9-an; mi tuj resendis ilin sed mi demandas kiam la koverto alvenis en Antverpeno, kiam oni presis, por nur deponi ĉe la poŝtoficejo mardon la 29-an.

Por la proksima jaro, ni denove zorgos en Charleroi por la dissendo sed la problemo estos : kiel rapidege ricevi la stokon ?

Pri la prezo, ne plu eblas peti nur BF 50 por la abono. Ni do anoncos en la proksima numero abontarifon de BF 100 (sed por tiu prezo la pagonto fariĝos "Amiko de Esperanto").

C. Raporto de la ĝenerala sekretario. (J. Bovendeerd)

Komence la sekretario raportas pri la hieraŭa estrarkunsido. Vidu la tiurilatan protokolon.

Aliaj aktivecoj en vere ne okazis kadre de BEF mem. La jarraporto estu do tiuj de ambaŭ regionaj asocioj APE kaj FEL.

8. (RE-)ELEKTO DE LA ESTRARO/ADMINISTRANTARO.

JB proponas lasi ĉion senŝanĝa, krom la jenaj kelkaj adaptiĝoj :
- aldoni S-ro BINOT al la estrara financa komisiono
- aldoni al la komitatanoj de UEA, Eliza KEHLET kiu apartenas al la estraro de UEA.

Aprobite.

Fino de la ĝenerala kunsido : 12.20 h.

-----------------